# Longa dormado - Mi dormis preskaŭ sep horojn

***1. Legu la tekston kaj maldekstre skribu la horojn per ciferoj.***

......... De la dek-unua horo dek kvin minutoj vespere, ĝis la sepa horo matene **mi**

.......... **dormis**.

.......... Je la dek-unua horo du minutoj **mi kuŝiĝis**.

.......... Je la dek-unua horo kvin minutoj **mi estis kuŝanta**.

.......... Je la dek-unua horo dek minutoj **mi estis kuŝanta** kaj **endormiĝanta.**

.......... Je la dek-unua horo dek unu minutoj **mi ekdormis**. (Neniu dubu: mi endormiĝis).

.......... Je la dek-dua horo mi **estis kuŝanta** kaj **dormanta**.

Je la unua horo **mi kuŝis** kaj **dormis**, kaj **kuŝis** kaj **dormis**.

.......... (Neniu dubu: ja **mi estis kuŝanta** kaj **dormanta**.)

.......... Je la unua horo kaj duono – **mi estis kuŝanta** kaj **dormanta** plu.

.......... Je la kvara horo kvardek minutoj **mi estis dormanta** plu.

Je la kvara horo kvardek du minutoj **mi** subite **vekiĝis** por momento, sed poste **mi**

.......... denove **ekdormis**.

.......... Je la kvina horo **mi estis dormanta**. Jes, **mi dormis**, kaj **mi dormis** profunde.

.......... Je la sesa horo **mi dormis** plu. Jes, **mi estis dormanta** ankaŭ je la sesa horo.

.......... Je la sesa horo kvindek kvin minutoj **mi sonĝis** ion malbonan.

Je la sesa horo kvindek sep minutoj mia patrino venis en la ĉambron. **Mi estis**

.......... **vekiĝanta**.

.......... Inter la sesa horo kvindek ses kaj kvindek ok minutoj **mi vekiĝis**.

Je la sesa horo kvindek ok minutoj **mi estis kuŝanta** sur la lito, sed **mi** ne plu

.......... **estis dormanta**.

**Mi dormis** preskaŭ ok horojn. Tempo konsiderinda. Je la sepa horo **mi leviĝis**.



***2. Legu denove la tekston, kaj elparolu la horojn.***

De la 11a horo 15 vespere, ĝis la 7a horo matene mi dormis.

Je la 11a horo 02 mi kuŝiĝis.

Je la 11a horo 05 minutoj mi estis kuŝanta.

Je la 11a horo 10 mi estis kuŝanta. kaj endormiĝanta.

Je la 11a horo 11 mi ekdormis. (Neniu dubu: mi endormiĝis).

Je la 12a horo 00 mi estis kuŝanta kaj dormanta.

Je la 1a horo mi kuŝis kaj dormis, kaj kuŝis kaj dormis.

(Neniu dubu: ja mi estis kuŝanta kaj dormanta.)

Je la 1a horo 30 – mi estis kuŝanta kaj dormanta plu.

Je la 4a horo 40 mi estis dormanta plu.

Je la 4a horo 42 minutoj mi subite vekiĝis por momento, sed poste mi denove ekdormis.

Je la 5a horo mi estis dormanta. Jes, mi dormis, kaj mi dormis profunde.

Je la 6a horo mi dormis plu. Jes, mi estis dormanta ankaŭ je la 6a.

Je la 6a horo 55 minutoj mi sonĝis ion malbonan.

Je la 6a horo 57 mia patrino venis en la ĉambron. Mi estis vekiĝanta.

Inter la 6a horo 56 kaj 6a horo 58 minutoj mi vekiĝis.

Je la 6a horo 58 minutoj mi estis kuŝanta sur la lito, sed mi ne plu estis dormanta.

Mi dormis preskaŭ 8 horojn. Tempo konsiderinda. Je la 7a horo mi leviĝis.





